

Intervjuo kun Claude Piron (6), pri la arto traduki kantojn en esperanton;
komparo de la fideleco de la tradukoj.

Radioprelego de Claude GACOND, SRI, 732/110, 1977 oktobro 19, 21 kaj 22.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1977-14/SRI-1977-14-B-8-110-Claude-Gacond-Intervjuo-kun-la-verkisto-kaj-poeto-Claude-Piron-6-pri-traduko-de-kantoj-en-Esperanton.mp3>

Cl.- Parolas Claude Gacond. Ni aŭdigas al vi hodiaŭ la sesan parton de intervjuo, kiun ni realigis kun la verkisto kaj poeto, Claude Piron, pri la temo: tradukado de kantoj en esperanto. Ni memorigas al vi ke Claude Piron tradukas kanzonojn el multaj lingvoj.

Ĉu vi havis la okazon kompari diverslingvajn tradukojn rilate al iliaj fidelecoj al la originalo ?

CP.- Jes, fakte, tio estas tre interesa studo, kiu rilatas ne nur al kantoj sed ankaŭ al literaturo, sed pri kantoj ĝi estas eble speciale interesa. Mi faris multajn komparojn kaj estas nekredeble kiel malofte kanto-tradukanto provas sekvi la veran signifon de la originalo. Plej ofte la tuta etoso de popolkanto estas fuŝita en la traduko. Kaj mi havas ĉi tie ekzemplon, kiun mi trovas aparte ribeliga, se mi povas diri. Temas pri kanto de Usonaj ministoj. Kaj tiu estas kanto tre akra, aspra, kanto kun revolucia atmosfero kaj atmosfero de perforto. Kaj mi havas ĉi tie la partituron de la franca traduko, kaj en la franca ĝi fariĝas tute dolĉa, preskaŭ am-kanto. Estas relative konata kanto, kiu en la angla nomiĝas ‘Sixteen touns’.

Cl.- Sed eble, ĉu antaŭ ol doni la ekzemplojn en la aliaj lingvoj, vi ankaŭ povus doni ĝin en esperanto unue, poste vi redonus ĝin en esperanto, por ke oni, se ni ne scias la anglan aŭ la francan, tamen povus koni la parolon ?

CP.- Eble mi povas unue kanti la anglan strofon, kiun mi trovas plej malbona kaj doni laŭvortan tradukon, kaj poste mi donos la laŭvortan tradukon de la franca.

(CP kantas en la angla)

CP.- Nu, laŭvorte tio signifas : ‘Se vi vidas min veni, prefere iru flanken. Multaj homoj tion ne faris, multaj el ili mortis. Pugno el fero, pugno el ŝtalo, se la dekstra ne trafos vin, vin trafos la alia. En la franca traduko, kiun mi havas ĉi tie, la vortoj estas france : ‘mais si toute la semaine tu crèves en bas, dimanche enfin tout le ciel est à toi, et dans tes draps blancs dès ton réveil les yeux de ta femme sont comme du soleil’. Kio signifas : ‘sed, se tutsemajne vi laborelĉerpiĝas malsupre, dimanĉe finfine la tuta ĉielo estas via kaj en viaj blankaj littukoj, ekde kiam vi vekiĝas, la okuloj de via edzino estas kvazaŭ suno.

Cl.- Estas nenio el la originalo.

CP.- Estas nenio el la originalo, estas vere perfido kaj mi trovas tion vere aĉa, se vi permesas la esprimon. Nun mi9 kantos la esperanto-tradukon, kvankam ĝi ne estas absolute laŭvorta, almenaŭ oni povas diri, ke la etoso, la klimato de la kanto kaj ĝia revolucia karaktero almenaŭ ne estis perfidita.

(CP kantas en esperanto)

Cl.- Ĉu vi posedas alian similan ekzemplon de kompleta perfido ?

CP.- Jes, sed bedaŭrinde mi ne kapablas kanti ĝin taŭge kaj mi ĉi tie petas pardonon de niaj slovakaj amikoj. Ĉar estas slovakaj kanto kaj la slovakaj ritmoj estas tre malfacile kanteblaj por okcidentano, aŭ tre okcidentano:

(CP kantas en la slovakaj)

CP.- ... aŭ io simila. Do, tio signifas ke : ‘dancu, dancu, dancu ronde kaj ne faligu la fornon, estas grave havi fornon vintre, kiam oni ne havas la lumon’. Mi havas la francan tradukon, kiun oni uzas en multaj ĥoroj de franclingva Svislando ĉi tie. Kaj la franca traduko signifas : ‘venu mia amikino kaj pretiĝu, pretiĝu, ni rapide kuru al la festo, al la festo, dancu kaj ne haltu, dancu kaj ne haltu, venu, lasu niajn kapojn turniĝi’. Do, kiel vi volas, estas absolute neniam rilato kun la originalo.

Nun mi havas du esperanto-tradukojn, mi ne scias, kiun mi uzos..., eble ĉi tiun:

(CP kantas en esperanto)

Do, eble la ritmo ne estas tute simila, estas pli bona traduko, kiun mi ne uzis, sed almenaŭ la signifo de la vortoj estas absolute kaj komplete respektata.

Cl.- La venontan semajnon ni aŭdigas al vi la sekvon de tiu intervjuo, kiun ni realigis kun la poeto kaj verkisto Claude Piron pri mia temo tradukado de kantoj en esperanton. Vi aŭdis el Svislando Claude Gacond kaj Claude Piron. Ĝis reaŭdo!

(CP kantas en esperanto)

Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), februaro 2014